# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

14-a jaro. n-ro 41 (2020:2)


*Karaj legantoj,*

*Preskaŭ ĉiuj landoj en la mondo kaj aparte en Afriko nun estas en embaraso, fronte al la sociaj kaj ekonomiaj perturboj kaŭzitaj de la malsano de kovim-19. Sed ambaŭflanke la repliko organiziĝas, kaj la respondoj tiom ekonomiaj kiom politikaj de la ŝtatoj helpas certigi iompostioman reziston kontraŭ la pandemio.*
*La afrika Esperanto-movado daŭre montras ian viglecon, danke al malgrandaj iniciatoj de la membroj de la Afrika Komisiono kaj de lokaj esperantistoj. Klopodoj estis faritaj nun ankaŭ por ne perdi la kontakton kun la enkontinentaj aktivaj esperantistoj, konsciigi afrikanojn individue kaj kolektive pri la koronvirusa malsano kaj ilin instigi daŭre respekti la higienajn kaj kontaktajn limigajn dispoziciojn por ke la verda flamo ne estingiĝu komplete en Afriko dum tiu monda santragedio. Krome, la afrikaj samideanoj ne atendas, kaj ili komencis pretigi la venontajn defiojn sur sia kontinento rilate al Esperanto-renkontiĝoj.*
*Mallonge, la ĉi-nova numero de la bulteno prezentas kelkajn movojn de la afrikaj e-istoj, iliajn konstantajn dezirojn pri Esperanto en la kontinento kaj ankaŭ raporton pri la inundoj lastatempe en Uvira, DR Kongo.*
*Bonan legadon kaj zorgu bone pri via sano!*

***La redakcio***

*****************

## Telegrama komunik-listo por inform(iĝ)i pri Afriko

La ligilo al la nova Telegram-diskutlisto pri Esperanto en Afriko: *https://afriko.telegramo.org.*

Jam kun pli ol kvardeko da membroj, la nova listo celas faciligi la amikajn rilatojn inter la grupanoj, ebligi al ili inform(iĝ)i pri la E-movoj tra Afriko. Temas ankaŭ pri kanalo por resti en kontakto kun esperantistoj dum ĉi tiu malfacila periodo de kronvirusa malsano. Krome, per la grupo eblas perfektiĝi E-lingve kaj movade danke al serio de fojfojaj klerigaj programoj.

La aliĝo al la listo estas malfermita al ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la afrika kontinento kaj tiea Esperanto-movado, kun aliro al la Telegram-aplikaĵo.

Telegramo estas senpaga nuba plursistema tujmesaĝilo por telefonoj kaj komputiloj senpage elŝutebla per muspremo al: *https://telegramo.org*. Esperantistoj uzas ĝin por sendi tekstajn kaj voĉajn mesaĝojn, kaj por telefonvoki aliajn uzantojn. Eblas sendi per ĝi ĉian enhavon: bildojn, filmetojn, movbildojn, glumarkojn kaj dosierojn. Ekzistas multaj grupoj, per kiuj esperantistoj povas paroli pri diversaj temoj.

Ĉiuj personoj de *Esperanto en Afriko* povas aldoni novajn esperantistajn membrojn al la grupo. Sed preferinde vi bv. paroli pri la grupo al viaj konatoj, geamikoj kaj afable inviti ilin mem rekte membrigi sin per muspremo al la ligilo: *https://t.me/afrikamovado.*

**Adjévi Adjé**

# Diluvo en Uvira, peniga kruco por la lokaj esperantistoj

Estas konate, ke la urbo Uvira kaj la tuta orienta parto de DR Kongo dum jaroj plej forte suferas pro nesekureco, konfliktoj kaj endemiaj malsanoj kiel ĥolero, malario kaj ebolo. Sed ekde la mezo de aprilo ĉi-jare la urbo travivas historie senprecedencajn inundojn, kiuj minacas komplete neniigi la urbon. Pro la torentaj pluvoj la riveroj kaj lago Tanganjiko montriĝis pereigaj, subite transbordiĝinte en la ĉirkaŭaĵojn kaj kaŭzis la morton de pluraj personoj, kortbestoj kaj faris gravajn materialajn damaĝojn.

Pluvegis la tutajn nokton de la 16-a kaj matenon de la 17-a de aprilo. Tiuj pluvoj inundis la riverojn, kiuj siavice kovris la urbon Uvira, detruante konstruaĵojn, forportante kioskojn kaj multajn aliajn valoraĵojn. Ĝi mortigis homojn, kies precizan nombron oni ankoraŭ ne scias. Multaj familioj ĝis nun ankoraŭ pluserĉas sian domon en kiu restis familianoj, kiuj ne sukcesis vekiĝi kaj fuĝi elhejme.

Ĉ. 40 mortintajn korpojn oni retrovis en la koto la postan tagon, sub daŭrantaj pluvoj. Pluraj miloj da familioj perdis sian hejmon. La plej grandajn ĝisnunajn damaĝojn, mortojn kaŭzis la subita altiĝo de la rivero Mulongvo. Tiu ĉi detruis eĉ la ĉefajn vojon kaj ponton, ligantajn la urbojn Bukavu kaj Uvira, kio ĉesigis la trafikon inter tiuj du urboj nun.

Komence estis timo pri la esperantisto Sosteno Emmanuel, la prezidanto de la Esperanto-Klubo de Uvira, sed li ja bonfartas same, kiel ĉiuj aliaj surlokaj samideanoj, nome Ramazani Nanjira Amiso, Espoir Ngoma Kasati, Mbomba Kuluba, Bukuru Nabahena kaj aliaj. Neniu esperantisto pereis en la katastrofo, feliĉe. Sed bedaŭrinde multaj el ili perdis komplete siajn enhejmajn havaĵojn. Tiuj pormomente fuĝis al lernejoj kaj preĝejoj, kie ili tranoktas en tre mizeraj kondiĉoj.


La urbo Uvira sub la akvoj….


Uvira dum la inundego

La situacio en la urbo Uvira ankoraŭ pli malboniĝis. Kvazaŭ ne sufiĉus la tragedia inundego, perdinte siajn havaĵojn, la elsaviĝintoj alfrontas nun la problemon de malario. Estas pluvsezono, multiĝas la kuloj, sed la homoj pludormas sen kulvualoj. Mankas trinkebla akvo, la sola ŝtata akvoproviza infrastrukturo en la urbo ĉesis funkcii pro detruiĝo. Pluraj homoj ankoraŭ ne havas eblon lavi sin aŭ ŝanĝi siajn vestaĵojn. Uvira iĝis vere fantoma urbo ne nur pro la inundego, ebola kaj koronvirusa malsanoj, sed ankaŭ pro la malsato, haŭtmalsanoj, ĥolero kaj grandiĝantaj problemoj de malsekureco kiel ŝtelado, rabado…

La trafitaj e-istoj en Uvira bezonas urĝe subtenojn. Ili bezonas nutraĵojn por pluvivteni sin, vestaĵojn por surmeti, kuracilojn, iom da mono, kiu utilus por plibonigo de ilia vivsituacio en la katastrofa periodo. Ĉiu alternativa donaco al la konto *Espero* ĉe UEA kun la celo *Uvira-20* estos same tre bonvena kaj ne malpli dankinda. Subtenante niajn afrikajn aktivulojn, vi pruvos, ke pli ol simpla lingvo Esperanto estas ankaŭ rimedo por la internacia solidareco eĉ en la ekstreme malfacilaj vivsituacioj.

**[Espoir Ngoma Kasati**
**Afrika Komisiono de UEA]**

# Uvira kiel fekunda grundo por la verda semo

En la lastaj jaroj pro la fakto, ke la lokaj e-istoj emas sindoni en la vola laboro por disvastigi Esperanton surloke, la urbo Uvira pli kaj pli fariĝis tre preferata Esperanto-urbeto en la oriento de DR Kongo. Spite de la daŭranta malsekureco en tiu landparto, la esperantistoj de Uvira unuanime, ankaŭ brave dediĉas siajn tempon kaj energion por disvastigi la lingvon Esperanto. Rezulte Uvira estas nun urbo kun kelkdekoj da Esperanto-parolantoj, el kiuj estas precipe junuloj kaj infanoj. La urbo estas fakte fekunda movadkampo, pri kiu la konga landa asocio DKEA povas forte kalkuli.

## Forcejo de esperantistoj

Uvira estas nuntempe la kerno de Esperanto en Sud-Kivu en tio, ke la nombro de e-istoj altnivele kreskas monaton post monato. Danke al lokaj aktivuloj, en la urbo kelkaj lernejoj akceptis enkonduki Esperanton en siajn lerno-programojn. Tiel danke al s-ro Merci Kwibe Esperanto sukcesis enhejmiĝi en la lernejo *La Reforme*, kie la verda lingvo estas instruata al infanoj. Siaflanke, s-ro Espoir Ngoma Kasati sukcesigis la Esperanto-instruadon en la junulara asocio *Groupe de Jeunes Leaders pour le Développement Intégral* (GJLDI), en la Instituto *Mawanga* [Mavanga] de Uvira, la lernejo *Amani* kaj tiu de *Herbart*. En ĉi lasta lernejo Espoir havis Esperanto-klubon por infanoj kaj junuloj, al kiuj li lastfoje aranĝis grupan ekskurson por malkovrigi al ili partojn de la lando.

S-ro Mboma Kuluba enirigis Esperanton en la lernejon *Ujuzi*, Ramazani Amisi en la lernejon *Delice* kaj Jérémie Kapunu, nun loĝanta en Kanado, estis la instruisto de ĉiuj nunaj junaj instruistoj en Uvira. Li mem havis E-klubon en la lernejo *Namuhindura* antaŭ sia vojaĝo al Kanado. En tiuj menciitaj lernejoj trovas sin geesperantistoj, kiuj pro manko de la novaj teknologiaj rimedoj kiel telefonoj, komputiloj ne havas aliron al interreto.

En 2017 Espoir Ngoma Kasati kunlabore kun GJLDI-junulara grupo elpaŝis publike pri Esperanto antaŭ la lokaj kaj regionaj reprezentantoj de la centra registaro en la ĉeesto de ĵurnalistoj. Tiuj ĉi lastaj ĉe la fino de mia prezentaĵo intervjuis min pri Esperanto kaj de tiam loknivele la vorto Esperanto unuafoje estis uzata en la gazetara medio.

## Surlokaj konkretaj atingoj

En Uvira Esperanto havas dinamikan soklon, sur kiu la junaj sindonemaj esperantistoj klopodas ĉiam pli vigligi la Esperanto-movadon. Nun ekzistas pli ol kvin Esperanto-kluboj tra la urbo danke al la aktivemo de pluraj lokaj fortoj. La instruemo, kiun havas esperantistoj en Uvira grandparte, konstribuas al multnombrigo de esperantistoj en Esperantujo. Ili foje eĉ uzas siajn proprajn etajn rimedojn por lui klasĉambrojn, aĉeti kretojn kaj pagi veturadon al Esperanto-kursoj. Ili ĉiam strebas pluvivigi kaj disvastigi la lingvon tra la tuta urbo en la limo de siaj ebloj. Ĉiumonate naskiĝas novaj esperantistoj, kiuj ekreginte la lingvon, siavice komencis instrui ĝin al ne-esperantistoj.

Uvira-esperantistoj ankaŭ aktoris kaj entute eldonis preskaŭ profesinivele jam 3 filmojn en Esperanto, nome: *Infanaj rajtoj*, *Dank' al la lingvo* kaj *Venĝemo*. Tiu ĉi lasta estas spektebla en jutubo per la ligilo: *https://www.youtube.com/watch?v=DhnXZriYVKE&t=395s.*



Espoir Ngoma Kasati (meze) kun la gelernantoj dum ekskurso.

# Senegalo alvokas al entuziasmo kaj postpandemio

**En la retletero de la 2-a de feb. 2020, s-ro François Hounsounou, la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, nome de la komisiono oficiale anoncis al la senegalaj e-istoj la aprobon de ilia landa kandidatiĝo por gastigi la 8-an Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE). En la ĉi-sekva intervujo al *Esperanto en Afriko*, Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta, du elstaraj membroj de Senegala E-Asocio, rakontas pri la nuna ĝenerala etoso kaj ankaŭ pri la plano por la 8-a AKE en 2022.**

*Ĉu vi bonvolas prezenti vin, vian landon kaj poste diri ankaŭ kelkajn vortojn pri la situacio de la koronvirusa malsano en via lando?*

Ni estas Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta, la prezidanto kaj la kasisto de Senegala E-Asocio (SEA). Nia lando troviĝas en la okcidenta parto de Afriko. Temas pri malgranda lando kun ĉ. 16 milionoj da loĝantoj. La oficiala lingvo estas la franca, sed apude ekzistas pli ol dek naciaj lingvoj. Senegalo posedas ses publikajn universitatojn kaj ankaŭ multajn privatajn universitatojn. La uzo de la araba en la lernado pli kaj pli disvolviĝas. De sia sendependiĝo en 1960 la lando konis kvar ŝtatprezidantojn.

La situacio estas ĉi-momente zorgiga pro la koronvirusa malsano. Ene de du monatoj aperis 933 infektitoj. 334 el ili resaniĝis, 9 bedaŭrinde mortis, 589 ricevas flegadon kaj 1 alilandano evakuiĝis al sia hejmlando. Estas deviga nun la surmetado de masko sur la vizaĝo, malpermeso de trafiko inter du malsamaj regionoj, elirmalpermeso de la 20-a ĝis la 6-a matene, fermo de lernejoj, universitatoj, preĝejoj, deviga distanciĝo de metro, limigo de la nombro de pasaĝeroj en publikaj kaj privataj transportiloj.

*Kia estis via sento kiam vi eksciis, ke la Afrika Komisiono elektis okazigi la 8-an AKE en via lando?*

Kontentaj niaj samlandanoj kaj ni mem estis, ekinformiĝante, ke la Afrika Komisiono de UEA elektis gastigi la 8-an AKE en Senegalo. Efektive, tiu elekto devus ankoraŭ pli instigi la senegalan E-movadon organiziĝi, pli-konigi nian lingvon al la cetera publiko kaj al la enlandaj aŭtoritatuloj. Per la 8-a AKE Senegalo ankaŭ pli malfermiĝos al Afriko kaj al la cetera mondo.

*Ĉu estas multaj esperantistoj en Senegalo? En kiu parto de la lando ili plejmulte estas?*

Estas relative granda nombro de e-istoj en Senegalo. La plejmulto el ili loĝas en la ĉefurbo Dakaro kaj en la ĉirkaŭaj urboj.

*Kiun periodon vi proponus por la kongresa dato kaj kiun temperaturon oni povas atendi?*

Ni emas proponi la kongresan okazigon en la lasta trimonato de la jaro 2022, pli precize la semajnon inter novembro kaj decembro, ĉar malpli varmas en tiu periodo. Plie, en tiu dato kutime estas malgrandaj ferioj por la lernejanoj.

*Kio estas la kongresejo kaj kie ĝi situas?*

La kongreso probable sidejos en iu publika lertigejo kun multaj tranoktebloj en la regiono de Thies - en la urbo Thies aŭ Mbour. Sed pro la koronviruso ni ankoraŭ ne finesploris la eblojn en tiuj du urboj por jam decidi pri unu. Ambaŭ urboj distancas de la internacia flughaveno je malpli ol 35 kilometroj.

*Ĉu la kongresurbo estas sekura urbo?*

Thies kaj Mbour ja estas sekuraj urboj. La kongresanoj povos trankviliĝi pri tiu aspekto do.

*Ĉe kiuj oni eventuale povas informiĝi pri la kongresaj pretiglaboroj surloke?*

Pro tio, ke pormomente ne eblas kunsidi por decidi la konsiston de la Loka Kongresa Komitato kaj dividi la taskojn inter ĉiuj membroj, oni, okaze de bezono, povas provizore turniĝi retmesaĝe pri la kongresa plano surloke al Assane Faye per: *fayeazou@gmail.com* aŭ al Lafi Charles Diatta per: *laficharlesd@gmail.com.*

*Ĉu vi havas apartan mesaĝon al la e-istoj ?*

Ni instigas ĉiujn esperantistojn respekti la preventajn aranĝojn de siaj respektivaj landoj kontraŭ la disvastiĝo de la koronviruso kaj kuraĝigas ilin teni la kontakton inter si laŭ la idealoj de nia lingvo. Ni scias ke malfacilas, dum oni ankoraŭ estas en la malcerta etapo de la pandemio mem, sed ni ankaŭ spronas ĉiujn resti entuziamaj kaj ekplani la postpandemion, ĉar kiel ajn longe estos la nokto, tagiĝos. Ĉiuj bv. tempon liberigi en sia agendo 2022 por veni konatiĝi kun la moviĝema parto de la afrika movado kaj (re)malkovri la mirindaĵojn de Senegalo.


**Intervjuis la redakcio**

# Senpaga aŭskultejo

Al Stano Marček estis sendita la propono jena: ke li donacu al la esperantistaro – en tiu ĉi malfacila tempo, kiam multaj el ni estas hejme – siajn sonlibrojn, kiuj aperis sur diskoj, en mp3-versio.

Li afable, tute ne kontraŭis la ideon, sed demandis, ĉu kadre de nia Germana Esperanto-Biblioteko *Aalen* eblus publike proponi tiujn legaĵojn.

Kompreneble ni subtenas tion kaj penas nun, pli kaj pli konstrui la alir-eblon al specifa "Stano-aŭskultejo" – laŭ planoj, ĝi enhavu fine (teknika rekomendo: elŝutu per dekstra musklako kaj konservu celon kiel…):




*Karaj esperantistoj tra la mondo,*

*Germana Esperanto-Biblioteko enmetis en la jam anoncitan novan retejon Aŭskultejo ankaŭ kantojn – ankaŭ tiujn de la rokmuzika grupo Teamo. Vidu/aŭdu/musklaku: t1p.de/auskultejo1.*

*Ni scivolas pri via opinio pri la nova retejo – kaj se vi konsentas, mi kaj Germana Esperanto-Biblioteko estos al vi tre dankemaj, se vi diskonigos la retejon en viaj gazetoj, retejoj kaj inter esperantistoj, viaj konatuloj.*

*Nova deponejo de miaj libere elŝuteblaj sonlibroj: <http://stano-auskultejo.bplaced.net>.*

*Aktuala propono de mia eldonejo: <http://www.edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=173&s=0140e179122db5ed1529ac4878564d0e>*

*UEA-Libroservo: <www.espo.link/stano>*

*"Apo" kun mia kurso por telefonoj: <http://www.iei.nl/apo/>*

*Miaj eldonaĵoj ĉe la reta libroservo Martinus (slovake): <martinus.sk/knihy/vydavatelstvo/Stano-Marcek>*

***Stano Marček***

# Invito al la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI

Saluton!

La anoncon pri nuligo de la ILEI-Kongreso en Kebekurbo vi certe aŭdis.

Nun ni povas anonci al vi, ke ILEI lanĉos la 53-an Virtualan Esperanto-Konferencon de ILEI sub la nomo VEKI, en la sama semajno, de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020. Do provu trovi agrablan lokon kun bona retkonekto, komfortan seĝon, iom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj; dum sep tagoj okazos prelegoj, debatoj, babiladoj, jogaj kursoj, koncertoj kaj aliaj eventoj, per reta konekto, kiu ebligas diskutojn kaj intervenojn. La programo aperos post diversaj esploroj survojaj. Estos ankaŭ senprogramaj paŭzoj, kiuj povos esti koridoraj babiladoj, ĉar ni havos la retkanalon 24 horojn tage dum sep tagoj.

Regule la estraro de ILEI eldonos anoncojn en la retejo *www.ilei.info*. Bonvolu viziti ĝin.




Ni petas vin eviti okazigon de aliaj retaj eventoj dum tiuj sep tagoj!

**Mireille Grosjean,**
**Prez. de ILEI**

# Interparolo kun togolandano pri la korona-viruso

**Lia kaŝnomo estas Nubuké. En la ĉi-posta intervjuo, tiu togolandano prezentas superrigardon pri la situacio de la koronviruso en Togolando kaj elvokas iujn instruojn lernitajn pri la ĉeesto de tiu timinda malsano en lia lando kaj en la kontinento Afriko.**

*Kia estas la situacio pri la koronvirusa malsano en Togolando?*

La situacio pli kaj pli iĝas maltrankviliga tiel, ke se oni ne atentas, ĝi estus ekster regado. Fakte, ekde la apero de la unua kazo la 6-an de marto en Togolando, la nombro de la kazoj daŭre kreskas: 153 infektitoj, 10 mortoj.

*Kiujn disponojn la registaro prenis por eviti la disvastiĝon de la viruso?*

Pluraj disponoj estis prenitaj, nome la tuja izoliĝo de la trafitaj urboj (la ĉefurbo Lomé kaj Sokodé); fermo de la moskeoj, preĝejoj, diskotekoj, trinkejoj, landlimoj. Al tio aldoniĝas la ĉesigo de kursoj en la lernejoj kaj universitatoj tra la tuta lando, deviga maskosurmetado por la kuracista personaro. Kaj krome, estas malpermesite eliri eksteren inter la 20-a kaj la 6-a horoj.

*Ĉu la togolandanoj respektas ĉi tiujn mezurojn?*

Ne precize. Vi scias, ke la afrikanoj estas sociemaj, kaj tio estas unu el niaj problemoj nun. Homoj daŭre ankoraŭ festas, grupiĝas, eĉ pompe okazigas funebrajn ceremoniojn. Dume, la registaro malpermesas renkontiĝojn de pli ol 15 personoj. Estas bona la sociumado, sed necesas iom da rezisto en nia konduto ĉi-tempe.

*Kio estas la ĝenerala sinteno de la togolandanoj, alfronte la disvastiĝon de la koronvirusa malsano en la lando?*

Mi dirus, ke la averaĝa moralo estas bona. Kaj homoj provas tiom organiziĝi, farante "improvizaĵojn" por la manolavoj per oleaj kanistroj kaj likva sapo (surloke farita) por la senhavaj tavoloj de la popolo; kiom por informi kaj konsciigi pri la "nova" malsano.

*En Madagaskaro, la prezidento Andry Rajoelina rekomendas la uzon de "Covid-Organics" (tizano surbaze de lokaj kuracherboj) por flegi la koronvirusajn malsanulojn, dum la Monda Organizaĵo pri Sano ŝajnas ne aprobi ĉi tiun terapion. Kio estas via opinio?*



Foto de la korona-viruso

Por la afrikano, kiu mi estas, tamen sub rezervo de kontraŭdiraj pruvoj, vidinte la foton de la prezidento mem trinkanta tiun dekoktaĵon, mi pli emas diri, ke *Covid-Organics* havas sian ekzistkialon kaj tutcerte montros siajn meritojn... Estas sufiĉe frue nun voli konkludi pri ĝi. Se kion ni manĝis estas nia kuracilo, ke nia kuracilo estas tion ni manĝas do, tiel longe kiel *Covid-Organics* mortigas neniun, ĝi certe iagrade utilas al la homa sano kontraŭ virusoj.

*Kiujn instruojn vi povas lerni el ĉi tiu koronvirusa pandemio?*

Unue, ĝi instruas al ni humilecon, ĉar necesis tia viruso por ke la riĉuloj konstatu, ke ilia vivo valoras ne pli ol tiu de malriĉuloj (riĉuloj kaj malriĉuloj estas flegataj en la sama hospitalo, ekzemple). Poste, ĝi levas la vivgravan trajton pri la scienca esplorado en la universitatoj kaj prisanaj centroj. Fine tiu pandemio memorigas al niaj ŝtatgvidantoj pri la neceso fari strukturajn ŝanĝojn en siaj prisanaj politikoj.

*Ĉu vi havas mesaĝon por la afrikaj esperantistoj kaj por tiuj, kiuj estas en Togolando?*

Dankon pro la demando. Rilate al la samideanoj en Afriko, mi invitas ilin respekti ĉiujn limigajn disponojn de la aŭtoritatoj de iliaj respektivaj loĝlandoj. Al la esperantistoj loĝantaj en Togolando, mi alvokas respekti la diversajn preventajn disponojn, praktiki memdisciplinon, precipe nutri la flamojn de la solidareco kaj de Esperanto.

**Intervjuon realigis Adjévi Adjé**

# Madagaskara terapio por preventi, flegi korona-viruson...

*Ĉu Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) prenis la tempon provi la madagaskaran terapion ''Covid-Organics'' antaŭ ol ĝin malrekomendi? Estas pandemio nun, kaj mortas miloj da homoj...*
*MOS-zorgo devus esti trovi solvon kiel eble plej tujan; do nun ne estas la tempo por diskriminacii aŭ disputi pri tio kiu estas la plej sperta sciencisto, kiu rajtas proponi kuracilojn, ktp…*
*La homa vivo ege gravas, kaj oni prefere klopodu savi la malsanulojn per provo de ĉiuj eblaj terapioj disponeblaj ol nenion fari antaŭ la monda hekatombo.*

**Nguefack Zedong Chamberline (Kameruno)**

********************

*Monda Organizaĵo pri Sano ankoraŭ ne proponis konkretan solvon por flegi la malsanulojn de la koron-viruso. Dume, mi opinias, ke la afrikaj landoj povas uzi disponeblajn solvojn surlokajn por flegi siajn popolojn, ĉu kun aŭ sen la aprobo de MOS.*
*Antaŭe gravas savi homan vivon, poste ĉio cetera povos diskutiĝi.*

***Jérémie Sabiyumva (Burundo)***

********************

*La homoj devas libere povi uzi la naturajn kuracherbojn en la formo de tizano, se entute tio efikas kontraŭ la koronaviruso, kiel tion la prezidanto Andrej Rajoelina rekomendas. Ne gravas, ĉu oni devas kontraŭagi la atentigon de MOS.*

***Paul Kusaya (Tanzanio)***

********************

*La malrekomendo de ''Covid-Organics'' pruvas, ke la t.n. grandaj organizaĵoj malriĉigas Afrikon kaj helpas teni Afrikon en malriĉeco. Se estus iu eŭropa lando aŭ Usono, kiu trovus tiun terapion, ĉiuj jam aprobus ĝin. Nun MOS ne konsideras nin kaj volas kiel ĉiam plu dependigi Afrikon de eksteraj kemiaĵoj, kaj ni afrikanoj tiel stultaj, ne kapablas kuniĝi por kuraĝigi Madagaskaron venki tiujn mafiojn. Niaj ŝtatprezidantoj faros nenion, ĉar la buŝo kiu manĝas, ne protestas. Eĉ niaj sciencistoj ne subtenas, ili nur konjektas pri la ''Covid-Organics'' tra la okulvitroj de la okcidento, kvazaŭ iliaj propraj gepatroj ricevis permeson de iu antaŭ ol kuraci ilin per la kuracherboj, kiam ili estis infanoj en Afriko.*

***Cyprien Guiya (Benino)***



La prezidanto de Madagaskaro kun Covid –Organics

*Ĝis nun mankas efika kovim-19-kuracilo, do ĉiu lando savas sin per la sperto de siaj kuracistoj. Certe Dio helpas ĉiun, kiu sin mem helpas. Mi alvokas esperantistojn praktiki regule sporton, surhavi maskon kiam ili eliras de la domo, teni sin distance almenaŭ metron de ĉiu alia persono, manĝi sanajn legomojn, fruktojn k.s. Nur tiamaniere ili mem povas sin protekti kaj ankaŭ siajn familanojn protekti.*

***Kasati Espoir (DR Kongo)***

********************

*Oni esperis, ke la pandemio mortigos multajn afrikanojn kaj aparte konganojn, sed mi konstatas la malon. Ĉu kaŭzi seriozan psikozon al ni estis fine la celo? La malario mortigas pli da homoj ĉiutage, sed neniam la amaskomunikiloj tiom priraportis.*
*Mi dankegas al tiuj, kiuj subtenas kaj kuraĝigas la esplorojn pri la madagaskara miraklo por la koronvirusa malsano. Bedaŭrinde multaj sciencistoj ankoraŭ ne fidas al siaj afrikaj kolegoj, sed ne pro tio Afriko devas abnegacii sin…*

***Merci Kwibe (Burundo)***

********************

*La ĉeesto de la koronaviruso en Afriko nenion konkrete ŝanĝos, ĉar jam delonge multaj afrikanoj spertas pli mizerajn endemiojn kaj ĉiajn malbonaĵojn ol koronaviruson. Ili daŭre elturniĝas por pluvivi kaj tiel ankoraŭ estos.*
*Antaŭe mi pensis pri tio, ke la t.n. evoluintaj landoj havas la plej klerajn sansistemojn, kiuj kapablus ene de kelkaj minutoj detekti kaj flegi ĉiajn malsanojn. Nun mia sinteno pri tio sanĝiĝis - ili restas homoj same, kiel afrikanoj. Antaŭ la kovim-19 ili same tremas kaj eĉ tiom mortas ne malpli ol afrikanoj, en kies landoj apenaŭ ekzistas veraj sansistemoj.*

***Ramazani Amisi Nanjira (DR Kongo)***

# Forpaso el la togolanda Esperanto-medio

Sekve de malsaneto forpasis s-ro Agbémadon Dido Folly [2020-1948], la estro de la familio Agbémadon de Zowla, la 12-an de aprilo en Lomé, Togolando. Lia entombigo okazis sabate la 9-an de majo.

Agbémadon Dido Folly mem ne estis e-isto, sed liaj gefiloj Agbémadon François, Dédé, Adolphe kaj aliaj ĉiuj lernis Esperanton kaj helpis ne nur al la disvastigo de la lingvo, sed ankaŭ al la konstruo de la movado en Togolando.

Indas ankaŭ mencii, ke la elstara togolanda e-isto s-ro Attiogbé-Agbémadon Mensah estas proksima parenco de la forpasinto.



Agbémadon D. Folly estis konata en la togolanda movado ankaŭ pro siaj afableco kaj gastamo. Li ofte disponigis senpage ĉambron en sia domo por gastigi plurajn alilandajn esperantistojn, kiuj vizitis Togolandon.

Certe ni - togolandaj esperantistoj - estas fieraj, ke en niaj vicoj troviĝis tia bonkora persono kiel li!

Kondolencon al lia familio kaj al ni ĉiuj!

**Adjévi Adjé**




***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj komprenеble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 42-a n-ro:** la 30-a de julio 2020.

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

**Kunordiganto:** S-ro François Hounsounou, **Benino**
**Vickunordiganto:** S-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**
S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org***.